Jarkolekto : 2007 | Numero : 1 | Paĝo : 1

La *Voĉo de Amikejo*

Informilo pri ***Senlime*** kaj **Esperanto** en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

BELGIO NEDERLANDO GERMANIO

Senlime
Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française

En cas de non-distribution, renvoyer à
H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzen@senlime.org

Editeur responsable
Responsa eldonanto +
Informoj en la franca lingvo:
Tel. +32-(0)87/33.02.92
GSM +32-486-947.957
Mail: jacques@senlime.org
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters,
BE-4800 VERVIERS

Informatie in het Nederlands
Informoj en la nederlanda:
Tel. xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren@senlime.org
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

Informationen auf deutsch
Informoj en la germana:
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@senlime.org
K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43
DE-52134 HERZOGENRATH

Aperas kvarfoje en jaro
Jara abono / aliĝo : 10 EUR

La kotizoj principe pagendas dum la novjara periodo (dec. – jan.).
Bonvolu pagi **NUR** al la konto :

000-0245571-64
IBAN: BE29 0000 2455 7164
BIC: BPOTBEB1
Esperanto-Grupo, rue Donckier 22,
BE-4800 VERVIERS

INVITO : 2007-04-20
19h30 BE-Kelmis, Select: gxenerala asembleo nekutima:
- statutaj sxangxoj,...
- financaj kaj kasistaj problemoj,...

TRILANDA RENKONTIĜO

Libertempo

Komunikas, ke pro manko da intereso kaj tro granda financa risko,

NE OKAZOS

la shipveturado al
THORN (NL)

Informas NUR P. Parren XX-31-(0)43-455 14 36
parren.media@planet.nl
aŭ J. Hanse XX-31-(0)475-53 43 25
libertempo@home.nl

Detalojn pri Thorn vi tamen legu p. 4 (tiu vizitinda urbeto feliche ne nur shipe sed ankaŭ aŭtomobile atingeblas !).

Kvarfoje dum la lastaj 7 jaroj (2001 Keukenhof, 2002 Liège-Simenon, 2006 Eben-Ezer, 2007 Thorn) ni nuligis jam duone organizitan trilandan renkontighon. La kialoj chiam samas:
- hezito kaj «silento» de la invitanto sekve de
- timo pro tro malgrandnombra cheestontaro (pro…
- laŭdire) tro alta prezo (+ kelkaj strangaj postuloj!).

Mi chi-foje definitive tiras mian konkludon: ***Senlime*** ne plu organizu TLR-ojn (tio estu eventuala iniciato de loka grupo: tial la Verviersa Grupo baldaŭ invitos vin la sia 100-jarigha festo, kaj Senlime vershajne invitos vin al la baldaŭ "tradicia" festo Neŭtralia dum kiu esperantistoj nepre cheestu!).

Kaze de TLR, mi rezervus en nia informilo du paghojn por la teksto (nepre ghustatempe finprezentota de la organizantoj) kaj la necesa alighilo estus aldonita al la sendo.

J-M. **Jacques**

Mozart

Malfacile direblas kiagrade framasonismo rolludis en la afero pri la projekto de sendependa esperanto-sxtato en Neuxtra Moresneto, sed estas konate ke la du protagonistoj, Gustave ROY kaj Wilhelm MOLLY, ja estis framasanoj kaj jam interkonatigxis (kvankam ni ne scias kiam kaj kie) antaux la fama renkontigxo en Jansmühle, kiun ni – okaze de la centa datreveno de la evento – teatroludis en Kelmis.

Tombo de D-ro MOLLY en la protestanta tombejo de Kelmis

2006 ankaux estis la jaro « Mozart », memore al lia naskigxo, en 1756. Kaj la fama komponisto - kiu dumvojagxe lauxiris la vojon de Aachen al Liegxo, pasante apud nia nuna kunvenejo - ankaux estis framasono…

Por la logio « Al la bonfareco » de Vieno, al kiu li apartenis, Mozart verkis plurajn muzikerojn, inter kiuj la du ariojn « Isis kaj Osiris » el « La magia Fluto ». La estra pastro Sarastro decidas ke Tamino kaj Pamina geedzigxos sed ili unue montru siajn virtojn venkante la elprovojn « de la akvo, de la fajro, de la aero kaj de la tero »,… precize kiel decas al framasono.

O Isis kaj Osiris,…

O Isis und Osiris, schenket
Der Weisheit Geist dem neuen Paar!
Die ihr der Wand'rer Schritte lenket,
Stärkt mit Geduld sie in Gefahr.

O Isis kaj Osiris, donacu
de la saĝeco spiriton al la nova paro !
Vi, gvidante de la vojaĝantoj pashojn,
fortigu per pacienco ilin en danĝero.

Lasst sie der Prüfung Früchte sehen;
Doch sollten sie zu Grabe gehen,
So lohnt der Tugend kühnen Lauf,
Nehmt sie in euren Wohnsitz auf.

Lasu vidi ilin de la provo fruktojn;
sed se devus ili tomben iri,
tiel rekompencu de la virt` aŭdacan kuron,
akceptu ilin en via loĝloko.

Chor der Priester

Ĥoro de la Pastroj

O Isis und Osiris, welche Wonne!
Die düst're Nacht verscheucht der Glanz der Sonne.
Bald fühlt der edle Jüngling neues Leben:
Bald ist er unserm Dienste ganz ergeben.
Sein Geist ist kühn, sein Herz ist rein,
Bald wird er unser würdig sein.

O Isis kaj Osiris, kia ravo!
La malluman nokton forigas la brilo de la suno.
Baldaŭ konos la nobla junulo novan vivon:
baldaŭ estos li al nia servo tute dediĉita.
Lia spirito estas aŭdaca, lia koro estas pura,
baldaŭ estos li inda je ni.

THORN,

« la plej blanka vilagxo Nederlanda »

Thorn situas en ia "akva lando", regiono tute simila al Frizonujo kaj Loodrecht koncerne la lag(et)ojn kaj do la eblecojn praktiki navigajn sportojn.

Se vi ŝatas la grandajn spacojn, venu vidi la "Maarsplassen", tiujn lagojn naskiĝintajn apud Roermond sekve de la gruza ekspluatado.

Du horojn necesas por gvidita vizito de Thorn, la plej blanka vilaĝo en la tuta lando.

Thorn estas loko kie tiu, kiu eksidas cxe antaux-trinkejo, nur povas esperi ke la tempo haltu. Al la tiea tradicia gastamo parte sxuldigxas tio.

Necesas diri ke la urbeto havas chion por placxi. La stratoj estas pavimitaj per sxtonoj el la Mozo kaj la domoj de la 18a jarcento blanke stukitaj estas legxe protektendaj.

Kiel Neuxtrala Moresneto (Kelmis), iame Thorn estis la centro de ia Princlandeto, sxtateto estrita de la abatino de monahxinejo kie altnobelaj damoj sin dedicxis al pregxado kaj meditado. Tiu monahxinejo havis sian tribunalon kaj ecx etan armeon kaj trudis siajn proprajn rajtojn pri pagoj, merkato kaj monemisio. La abatino krome rajtis titoligi sin "Princino" kaj ludis tiun rolon en la urbo.

En 1794 la francoj cxesigis tiun "inan princlandon", sed sendifekte postlasis grandan parton de la malnova Thorn. Lauxlonge de la placo vicigxas la dometoj de la kanonikinoj kaj la abata pregxejo el la 14a jarcento.

Tiu-cxi prezentigxas kiel kruca baziliko laux la gotika stilo cxarmigita per baroka interno belbrilege restauxrigita. Funde de la pregxejo estas ekspoziciata skizo pri la malnova Thorn.

La abateja pregxejo en Thorn

La historia centro kaj la abateja pregxejo cxiam allogis multajn vizitantojn. Pli poste la turisma oferto pliampleksigxis al muzeo : "la Thorn-a tero". Rimarkinda parto de tiu muzeo estas le Thorn-a panoramo », "tridimensia pentrajxo", fare de la artisto Frans van den Berg.

Dum la lastaj jaroj, la urbestraro provis disvolvigi diversajn turismajn subproduktojn por celitaj grupoj. Marsxemuloj, biciklantoj, akvo-sxatantoj, sportemuloj kaj virinoj estas allogitaj per ricxa oferto.

Aparte agrablas la lagoj kaj la rimarkinda naturo, kiuj kontribuas al la sukceso de la eta blanka urbo kaj de gxiaj diversaj turismaj produktoj.

Por pliaj informoj, kontaktu :
VVV-Thorn (telefono : XX-31-(0)475-562761 ; E-mail : thorn@regiovvv.nl).

ESPERANTO ✪

Euxregiona kalendaro 2007 (1/2)

Senlime publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-arangxoj en la Euxregiono Mozo-Rejno. Gxi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontigxoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aux esperanto-grupo en Euxregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de ***Senlime***. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj auxtune), lauxvice en cxiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-cxi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aux aktivajxojn organizitajn aux subtenitajn de komitatanoj. Gxi neniel igxu kompleta kalendaro de esperanto-arangxoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de ***Senlime*** nun regule okazas cxiun trian vendredon de monato en kultur-centro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, cxiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro : Jean-Marie **Jacques** (jacques@senlime.org).

01-19 Vintra pauzo : ni ne kunvenos en Kelmis (virtuala rendevuo sur la reto !).

02-16 Karnavala pauzo : ni ne kunvenos en Select, virtuala rendevuo sur la reto !.

03-16 19h30 BE-Kelmis, Select: Marcel DELFORGE parolos pri «Nekutimaj vortoj en esperanto» (kunportu vortaron !)
Inf. Marcel Delforge.
mardelforge@brutele.be

04-20 19h30 BE-Kelmis, Select: nekutima gxenerala asembleo de Senlime : statutaj kaj organizaj sxangxoj (kasistoj,…),...
jacques@senlime.org

05-18 19h30 BE-Kelmis, Select: 2006-Jaro **Mozart "Don Giovanni"**
Inf. Jean-Marie **Jacques.**
jacques@senlime.org

06-15 19h30 BE-Kelmis, Select: karaoke en esperanto
Inf. Didier Lousberg
lousberg@senlime.org

✪

Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, okazos la: **07-20, 08-17, 09-21, 10-19, 11-16** kaj **12-16** (Zamenhof-festo).

01-19 Pause hivernale : nous ne nous réunirons pas (rendez-vous sur internet !).

02-16 Carnaval : pas de réunion au Select, rendez-vous virtuel sur le net !.

03-16 19h30 BE-Kelmis, Select: Marcel DELFORGE parlera des «Mots inhabituels en espéranto» (apportez un dictionnaire !)
Inf. Marcel Delforge.
mardelforge@brutele.be

04-20 19h30 BE-Kelmis, Select: assemblée générale extraordinaire de Senlime : changement des statuts et de l'organisation (caissiers,...),…
jacques@senlime.org

05-18 19h30 BE-Kelmis, Select: 2006-Année **Mozart "Don Giovanni"**
Inf. Jean-Marie **Jacques**.
jacques@senlime.org

06-15 19h30 BE-Kelmis, Select : karaoké en espéranto.
Inf. Didier Lousberg
lousberg@senlime.org

✪

Réunions suivantes au Sélect, La Calamine (BE), les: **07-20, 08-17, 09-21, 10-19, 11-16** et **12-16** (fête Zamenhof).

Ĉelandlimaj krimoj

aŭ, neatendite, teksto pri la "filozofio" de Senlim€

Senlime *reproduktas ĉi-sube artikolon ĉerpitan el la reto, de Phil* ***Dorcas****, prezidanto de Esperanto Ligo Nord-Amerika, kiu mirinde reliefigas la filozofion de «* ***Senlime****co ».*

Ni ege dankas al Leo ***De Cooman*** *kiu bonvolis traduki por ni tiun gravan kaj pensigan (originale anglalingvan) mesaĝon.*

Antaŭ nelonge estis granda tumulto en la komunikiloj dum la voĉdonadaj kampanjoj pri ĉelandlimaj krimoj. Politikistoj longe kaj laŭte parolis pri ĉelandlimaj krimoj, kio ili estas, kaj kion fareblas pri ili. Mi eltenis la aŭskultadon al la kampanjoj nur dum tempeto antaŭ ol halti la aŭskultadon aŭ legadon. La temo eble estas pli atentiga ĉi tie en Teksaso ol en aliaj ŝtatoj.

La temo venas en momento, kiam plej multaj homoj ekpensas pri konstruado de kradoj, estigante pliajn barilojn inter landoj. Kaj la politikistoj provas solvi leĝan problemon, kiu koncernas la socion plurmaniere.

Tamen estas **aliaj "ĉelimaj krimoj".**

Tiuj krimoj estas perfortoj, kiujn ni Esperantoparolantoj faras. Jes, mi akuzas nin. Ni kulpas. Ni havas nian propran limproblemon en Esperantio.

Iuj pensas pri la krimo kontraŭleĝe transiri la limon inter Usono kaj Meksiko. Mi pensas pri inversa problemo, pri ne transiri la limon, kiun ni ja devas transiri.

Ni havas internaciajn limojn transireblajn far ni, estante Esperantistoj, kiujn ni ne sufiĉe ofte transiras. En niaj konversacioj kun aliaj, en niaj kunvenoj, en nia planado, kaj eĉ en nia pensado, ni ne konsideras la uzon de Esperanto, kia ĝi estas celata.

Esperanto estas internacia lingvo. Ni uzu ĝin internacie.

Ni ĉiam provu doni al niaj klubaj kunvenoj sencon de "internacieco". Ni devas raporti pri internaciaj agadoj, internaciaj korespondoj, internaciaj novaĵoj, internaciaj amikecoj, kaj ajna alia speco de internaciaj agadoj kiuj envenas en la menson.

Ni devas persone serĉi internacian amikecon kaj konstrui la pontojn, kiujn Esperanto ebligas nin fari.

Imagu kion ne-Esperantisto pensas observante nin agantajn, kiel ni faris antaŭ ekkoni Esperanton, kaj Esperanto ne havis efekton en nia vivo? Imagu, kion ili pensas pri sia vizito en Esperanto-klubon, se ne estas raporto pri internacia okazintaĵo, nek literaturo de aŭtoro en alia lando, nek iu mencianta korespondon transmaran. Ni tute same povus paroli la anglan kaj fini ilin.

Se Esperanto havis efekton en ni, ĝi devas esti klare aperanta. Internaciaj konektoj devas esti en la unua plano de nia pensado kaj sur la pinto de nia lango. Niaj ne-Esperantistaj amikoj kaj kun-laborantoj devas klare konscii, ke ni estas Esperantistoj, kaj ke estante tiaj ni havas internaciajn amikojn, konektojn kaj aktivecojn. Ili devas scii, ke ni kapablas legi revuojn MONATO, ESPERANTO, JUNA AMIKO, aŭ LITERATURA FOIRO same kiel ili legas TIME, PEOPLE aŭ THE ATLANTIC MONTHLY.

Donu piedojn al la lingvo.

Esperanto estas sufiĉe forta por vendi sin mem, sed ni devas montri ĝin sub la plej taŭga lumo por la plej bona rezulto. Ĝi devas esti aperanta, videbla, parada, prilumata, kaj priraportata al la ne-Esperantista Ameriko.

Ni devas transiri la internaciajn limojn, tiujn limojn dividantajn landojn, kulturojn kaj klasojn. Ni povas kreskigi mondan interkompreniĝon por plibonigo de la homaro. Kaj ni povas fari tion sendepende de la nivelo de nia propra scipovo de Esperanto.

Fari malpli ol tio estas ĉelima krimo.

Filipo (Phil **Dorcas**)
prezidanto, ELNA

Elangligis Leo **De Cooman**.

Verviersa Angulo Verviersa Esperanto Grupo

LE GROUPE A 100 ANS …et bien des projets !

Comité de V.E.G.:

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: R. Demarche (démissionnaire)
22 Rue Donckier
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.68.18

Secrétaire: J.-M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour l'Espéranto (A.P.E.)
M. Delforge
16 Rue des Glacières
6001 MARCINELLE

Cotisations

Les espérantistes et sympathisants de l'Eurégion sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant dès aujourd'hui l'une des cotisations suivantes au compte
n°: **000-0245571-64**
IBAN: BE29 0000 2455 7164
BIC: BPOTBEB1
de:
Esperanto grupo
22 Rue Donckier
BE-4800 VERVIERS

*La cotisation de **Senlime** est restée inchangée depuis sa création.*

D'avance, merci à tous !

A.P.E. 2007 14 €
U.E.A. 2007 57 €
Senlime 2007 10 €

en indiquant le nom du membre cotisant, le bénéficiaire et l'année:
«cotisation de …. pour ….».

Amikejo

La Calamine (Kelmis) et l'ex-territoire de «Moresnet Neutre» appartiennent à présent (comme la petite ville Néerlandaise de Vaals) à la périphérie de la ville d'Aix-la-Chapelle (Aachen). Les deux centres, distants de 8 km seulement, sont reliés, chaque heure, par un bus allemand confortable et rapide.

Si le projet d'état espérantiste indépendant pouvait, en 1908, être qualifié d'utopique en raison du manque d'infrastructures (hôtels, grand théâtre,…), il n'en est donc plus de même de nos jours.

Le développement d'un centre espérantiste à La Calamine(-Vaals-Aachen), en raison de l'intérêt historique et géographique (proximité des trois frontières/langues) de l'endroit, est l'un des buts actuels du groupe de Verviers.

En attendant la création éventuelle d'un groupe autonome à Kelmis, le groupe de Verviers s'y réunit chaque mois avec ses homologues néerlandophones et germanophones dans le but d'y pratiquer l'espéranto.

On devrait donc trouver à La Calamine les activités habituelles d'un groupe local. Si les cours pour débutants semblent plus faciles à organiser, sur base linguistique, séparément dans les trois pays/langues (donc, à Verviers, en français), il n'en va pas de même pour les cours de perfectionnement, qui pourraient avantageusement être suivis à Kelmis, uniquement en espéranto (pour les verviétois également !).

Scolaweb

Scolaweb est le nom d'une école virtuelle créée sur Internet pour faciliter l'étude et la pratique de l'espéranto par des personnes n'ayant qu'une formation de base.

Le projet Scolaweb comprenait donc un cours d'espéranto, un cours de mathématiques (bases minimales mais aussi aspects formatifs du cours de mathématique trop souvent oubliés dans les programmes des écoles officielles) et un cours de « culture générale » (qui, vue sous un angle international sinon « anational », peut également être bien différente de l'officielle).

Cinéma

Dans le monde des espérantistes (plus encore que chez les non-espérantistes), la culture a trop souvent et trop longtemps été livresque. Au point que la fête Zamenhof, dite fête de la culture, est devenue en fait la fête du livre !

Les arts du spectacle et des techniques de diffusion sont venus s'ajouter à la culture de base d'un «honnête homme» (à tel point qu'il est aujourd'hui tout à fait envisageable de donner un «certificat d'études de base» à quelqu'un qui ne sait ni lire ni écrire). L'aptitude à suivre un film (comme celle d'utiliser un ordinateur, un GSM, etc…) est devenue essentielle.

Il nous semble donc nécessaire et urgent de mettre, dans les plus brefs délais, à la disposition du monde entier les principales œuvres cinématographiques (le cas échéant théâtrales ou chantées) malgré l'inévitable problème des langues.

Vu la difficulté du doublage, c'est vers le sous-titrage que Senlime (groupe de Verviers) s'est résolument tourné en réalisant déjà la traduction d'une douzaine de films, dont le « Don Juan » de Mozart.

Si le nombre de collaborateurs se révèle suffisant, le sous-titrage de l'entièreté de la «tétralogie» (Ring) de Wagner est à faire ! (MERCI !).

Jean-Marie **Jacques**